MUZIKO NE NUR POR INFANO

CANTIGAS DE RODA E OUTRAS POPULARES EM ESPERANTO

Versioj de Jorge das Neves

Enkonduko

La muzikaĵoj por infanoj nomiĝas
portugallingve “*cantigas de roda*”,
ĉar infanoj kantas ilin ronde kun la manoj interplektitaj.
Tiuj kantoj tradicie rezistas al tempo.
Ili apartenas al brazila kulturo kaj pro tio,
Jorge das Neves
kaptis la muzikon sed adaptis la originalajn tekstojn
simile al io, kio eble povas esti konsiderata
universala kulturo
!
Espereble la muzikaĵoj tiel tradukitaj helpos al komencantoj
eĉ al veteranoj, dezirantaj amuziĝi per kantado.

1. LA ESTONTO ESTAS NI

Ciranda, cirandinha

Kolego, kolegino
la estonto estas ni
estas gloro en la fino
se ni lernas pli kaj pli

Ni parolas kaj muzikas
du plus unu faras tri
Esperanto ne komplikas
la estonto estas ni!

2. IRU PLU

Rema, rema, remador...

Iru, iru
al progreso
sen maltrafo
sen forgeso (BIS)

3. MARŜU, SOLDATO!

Marcha, soldado

Marŝu , soldato
sur mondo sen milito
al Esperanto
prosperas la invito (BIS)

4. FOR DE L' LUDO

Uni, du, ni, tê

Unu, du kaj tri
ne valoras pli
ĝis revido, fartu bone
iru for de ĉi!

5.EN MIA KOR

Cai, cai, balão

Kaj li kaj ŝi
kaj ĝi kaj vi
kaj multe multe pli
tie for
tie for
tie for
tie-ĉi en mia kor'

6.PATRO KAJ PATRINO

O cravo brigou com a rosa

Parolas mia patrino
atente aŭskultas mi
mi amas, ke ŝi parolu
ĉar multe instruas ŝi

Ĵurnalo, jen por la patro
ĝentila fariĝas mi
li estas mia heroo
patrin' estas multe pli !

7.AVO KAJ AVINO

Teresinha de Jesus

Al la avo diris mi
ke mi volas iri for
la avino multe ploris
kun malĝojo en la kor'

Mi komprenis, ke infan'
ne feliĉas sur la Ter'
se la avo kaj avino
vivas en granda sufer'

8. TUTA FAMILIO

Capelinha de melão

Mi parolas, kantas mi
kaj promenas for
kun la tuta familio
ene de la kor' (BIS)

9. AMIKARO

Carneirinho, carneirão

Familio, famili', mili', mili'
ja dependas de nia Di', de nia Di'
preferindas amikaro, amikar'
kaj ni ludas per kantar' (BIS)

10. MIA KATO

Atirei o pau no gato

Mia kato ja miaŭas tro
mia hun-de-to'
bojas kontraŭ ĝi
kaj najbar' , ro, ro
nervoziĝas pli
freneziĝas, freneziĝas
kaj ripetas
M I A Ŭ !

11. PATRO FRANĈJO

Pai Francisco entrou na roda

Patro Franĉjo ludas be-e-le
per mirinda violon'
poron' - pompon'
poron' – pompon'
Filineto dum la festo
vigle dancas per gaja gesto
Svingiĝas ŝi
svingiĝas pli, svingiĝas plu
svingiĝas ni !
Svingiĝas ŝi, svingiĝas pli, svingiĝas plu, svingiĝas ni !

12.LA ANĜELO

Nesta rua tem um bosque

Niastrate, niastrate estas bosko
kie loĝas, kie loĝas la Anĝel'
la Anĝelo amas floron, amas beston
la naturon, kiun kreis la Ĉiel'...

Se mi estus, se mi estus la Anĝelo
nia mondo estus mondo de prosper'
komprenado, toleremo kaj la amo
estus nia tuta forto sur la Ter'.

Kompreneble la Anĝelo tre valoras
kaj dependas, kaj dependas nur de ni
la Anĝelon imitadi serioze
ja hodiaŭ, ĉi-momente, tie-ĉi!

13. VEKIĜU, MARIJA BONITA

Acorda, Maria Bonita

Vekiĝu, Marija Bonita
vekiĝu en la frumaten'
la tago ja komenciĝas
la suno brilas en la ĝarden'

En la ĝardeno birdoj kantas
la bedoj plenas je floro
ne via koro konstantas
sed konstantas mia koro!

Vekiĝu, Marija Bonita...
.....

Vi Esperanton ne parolas
sed amindumas konstante
se mian kison vi volas
mi volas kisi ... Esperante!

14.S A L U T O N !

Quem parte leva saudade

Adiaŭ, samideano,
kaj vi, samideanino tre kara,
en nia kunveno ni kantas
pro nia ĝojo senkompara.
Ha, kia ĝoj'!
Ĝi estas ja trezoro
pro l' amikeco plene sincera
loĝanta en nia koro.

15.E L E F A N T A R O

Um elefante incomoda muita gente

Elefantido tre grandas tie-ĉi
UNU elefanto grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
DU elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
TRI elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
KVAR elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
KVIN elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
SES elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
SEP elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
OK elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
NAŬ elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
DEK elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
CENT elefantoj grandegas multe pli
Elefantidoj tre grandas tie-ĉi
MIL elefantoj grandegas multe, multe, multe pli!

16. KUN FORTA VOLO, ENTUZIASME!

(Olê, olê, olá!)

Por Esperanto, per Esperanto
ho, ho, ho, ho, ho, hoj!
Por Esperanto, kun forta volo,
laboras ni kun ĝoj' .

Por Esperanto, kun forta volo,
laboras ni kun bril' !
Per Esperanto, entuziasme,
BRAZIL' ! BRAZIL' ! BRAZIL' !

JORGE DAS NEVES
* Georgo Das Neves *
poetakarioka@hotmail.com